



TEA-BULTENO

23^A JARO - N° 150

JANUARO-FEBRUARO

N. 1-2/2020

Kiel estas regata la mondo? Kiel komenciĝas la militoj?
La diplomatoj rakontas gurde mensogojn al ĵurnalistoj kaj fine ili mem kredas je ĉio kion ili legas.
Karl Kraus, aŭstra ĵurnalista kaj verkisto (1874-1936)

BONAN NOVAN JARON!

Karaj Gelegantoj!

Tutunue, eĉ se iom malfrue, bonvolu akcepti miajn plej sincerajn kaj amikajn bondezirojn por la nova jaro: ke ĝi kunportu Pacon kaj Unuecon tra la mondo, ĉar tiuj ĉi tre bone konataj vortoj, elbuŝigataj foje senkomprene kaj senkonvinke, entenas en si mem ĉiajn plej belajn dezirojn kaj aspirojn de la homaro!

Ĉi-jare anstataŭ enkondukaj vortoj de la redaktanto, vi legos poemon de pli aŭtoritata, de pli sentema plumo, ol la mia. Ĝi estas malnova, ĝi aĝas jam 115 jarojn sed plej kredeble daŭre tre aktualas. Certe multaj el vi ĝin konas, eble eĉ pakere, sed ties ĉi (re)legado valoras ankaŭ nuntempe, aŭ -pli bone dirite-, precipe nuntempe!

Preĝo sub la verda standardo

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
fortego, la mondon reganta,
al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
kaj fonto de vivo konstanta,
al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
kun dogmoj de blinda fervoro:
silentas nun ĉiu disput' religia
kaj regas nun kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
ĉe via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
sed ĝi sin dividis batale;
popolo popolon atakas kruele,
frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
redonu la pacon al la infanaro
de l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin Forto, ne lasu nin fali,
sed lasu nin venki la baron;
donacu Vi benon al nia laboro,
donacu Vi forton al nia fervoro,
ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreaĵoj aŭ mahometanoj
ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
frata la celo ni iru obstine
antaŭen, senfine.

Lazaro Ludoviko Zamenhof



21^a Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio Rijeka - Kroatio, 05-07 de junio 2020



Konferencejo: Palazzo Modello, Str. Uljarska 1, Rijeka

Sekretario: Edvige Ackermann (nored@tiscali.it)

Temo de la Konferenco: Per Esperanto trans limoj

Kunlabore kun la Itala Komunumo en Rijeka

Pli da detaloj en la venonta TEA-Bulteno.


Nova monumento en Triesto

Trairante Trieston, oni povas admiri, krom statuoj aŭ bustoj honore al gravaj triestaj kaj/aŭ italaj eminentuloj, ankaŭ pli imponajn monumentojn, inter kiuj plej famas tiuj dediĉitaj al la habsburga arkiduko Maksimiliano (farita en 1875) kaj al Elizabeto, edzino de imperiestro Francisko Jozefo (en 1912). Ili estis starigitaj en du diversaj placoj: la unua fronte al la maro kaj rigarde al kastelo Miramar, kiu estis konstruigita de Maksimiliano; la dua, tiu de Sissi, vid-al-vide de la centra stacidomo. Ambaŭ, post la unua mondmilito, estis malmuntitaj de italoj, ĝis kiam, tio estas en 2008 kaj 1997 respektive, oni ilin relokigis en la originan situon.

Unu el la plej preparolataj lastatempaj proponoj koncernas la starigon de monumento memore al la Habsburga imperiestrino Maria Tereza. Okaze de ŝia 300^a naskiĝ-datreveno (2017) establiĝis Komitato kiu energie eklaboris por ties realigo. Pasintjare fine estis lanĉita konkurso por la farado de tiu monumento en placo Ruĝaponto (*Ponterosso*), flanke de la Granda Kanalo, ĝuste en la Tereza-kvartalo, gajnita de tri po tridekjaraj artistoj triestaj. Ili estis premiitaj septembre 2019.

Kiel aspektos la verko, nomita MoneTA (MonERO)? Temas pri granda reprodukto de la aŭstria talero, uzata en la tempoj de la imperiestrino, simbolanta la riĉecon de ŝi alportitan al Triesto. Do, sur unu flanko reliefaĵo de Maria Tereza; sur la alia, spegula surfaco sur kiu rebrilos la kanalo kaj la ĉirkaŭaj belaĵoj, kies historia *forĝisto* ŜI estis. La talero, el fandaĵo de bronza alojo, ŝajnos *enbategita* en la pavimon, kvazaŭ la urbo mem estus giganta monujo. Tio povus eĉ elvoki la antikvan moron meti moneron sub tegolon de domo ĵus elkonstruita, kiel bonan aŭspicion.

Signifoplena estas la kialo de tiu elekto. Tion ĉi la artistoj deklaris: "Ni ĉiuj estas la reflektiĝo de la elektoj de Maria Tereza. La ideo nask-iĝas el vidserĉado de la diversaj manieroj, laŭ kiuj la imperiestrino estis portretita. Unu el ŝiaj bildoj estas ĝuste tiu aperanta sur la monero, kiu alprenis ŝian nomon: *Maria Theresia Taler*. Ĉi monero ekcirkulis en 1780 kaj estis uzata por la internacia komercado dum pli ol cent jaroj. Ĝi estis konata eĉ ekster la habs-



burgaj landlimoj, ĝis Afriko, Arabujo kaj Hindujo." Fakte la talero ricevis tiel grandan disvastiĝon danke al la prospero de la imperia haveno kaj al la evoluado de floranta komercado, igantaj Trieston grava metropolo kaj unu el la plej aktivaj eŭropaj havenoj.

Sed, kial monumento ĝuste al Maria Tereza, kiu dum sia 40-jara regado neniam estis en Triesto?

Antaŭ ol respondi rekte al tiu demando, unue ni konatiĝu iomete kun ŝia patro, imperiestro Karlo 6^a. Ŝajnas, ke li ne estis tro interesita pri politiko, tamen li, sekvante tiun de la frato, igis interkonformaj la leĝofaradon kaj la burokratismon, almenaŭ en Aŭstrujo, Bohemujo kaj Flandroj, konkretigante merkantilisman sistemon pere de nuligo de internaj akcizoj, pliigo de rektaj impostoj kompare al la nerektaj, establo de ŝtata monopolo kaj komerca intensigo. Sekvante tiujn principojn li, en 1719, donis la statuson de Sendogana haveno al Triesto. Danke al ĉio ĉi la habsburga imperio atingis la pinton de sia ekspansio.

Tio ĉi signifis la fortunon de la urbo, kaj tiom pli kiam lia filino Maria Tereza fariĝis imperiestrino. Ŝi malfermis la urbon al nepenseblaj favoraj perspektivoj: homamasoj venis el ĉiuj ajn mediteraneaj lokoj, serĉe de pli bona vivo kaj ebloj riĉiĝi.

Maria Tereza malstarigas la mezepokajn murojn planante la unuigon de la malnova urbo kun la nova dediĉita al komercado (la teritorio, en kiu ŝi koncentriĝis, estis iama salejo, senakvigita kaj salubrigita); ekokupiĝas pri saneco, cele la protektadon kontraŭ malsanoj de la civitanoj apartenantaj al kiu ajn socia tavolo. Tial ŝi konstruigas akvoduktojn por alporti fluantan akvon al ĉiuj, sendistinge, kaj por estingi brulojn. Ŝi konstruas vastan lazareton, orfejon kaj malsanulejon, tiel grandan por servi urbon trifoje pli multnombrian, ol la tiaman Trieston. Poste ŝi reformas la lernejan sistemon kaj fondas la Naŭtikan lernejon. Tiel agante la imperiestrino ĵetas nur la semojn de urbo kiu bunte ekfloros post ŝia morto malgraŭ la nekredible rapidega akcelo kiun ŝi donis al Triesto.

Se oni trairas la Terezan kvartalon, ĉirkaŭ la Granda Kanalo, elfosigita de Maria Tereza, kiun ĉirkaŭas elegantaj palacoj kaj magazenoj, simboloj de la emporia urbo, videblas tio kion ŝi intencis realigi sed ne sukcesis persone vidi, se ne en

la projektoj. Inter la jaroj 1750 kaj 1780 oni povis admiri la paradon de la velŝipoj, ŝarĝitaj per la varoj destinitaj al lokaj kaj eksterlandaj merkatoj.

Gravas fine scii, ke tiu kvartalo estis la emblemo de la nova civitanaro, ĉar la konstruaĵaro klare vidigis sian komercan funkcion: en la teretaĝo ampleksaj magazenoj, en la unua etaĝo alirebla tra monumenta ŝtuparo, la tiel dirita *nobela etaĝo*, kie estis la loĝejoj de la familio, en la supraj etaĝoj, oficejoj kaj ankoraŭ pli supre, en la subtegmentejo, loĝejoj por la servistaro. Ne forgesendas, ke en tiu periodo estis starigita la Ŝipfarejo de Odoriko Panfili, kiu estis la plej grava ŝipkonstruisto.

Laste trovitaj!

Plimultiĝas la ebloj malkaŝi malnovajn E-kartojn foje je ridindaj, foje je priplorindaj prezoj: ĉio ĉi okazas pro la alireblo al diversaj retaŭkcioj. Nura problemo estas, ke oni devas havi je dispono sufiĉe da tempo kaj ... sufiĉe da pacienco por zorga traserĉado. Tempo ĉiam tro malmultas, sed kolektemo estas frenezula manio al kiu malfacilas rezisti, tial preskaŭ ĉiutage nepras dek-minuta dediĉiĝo al tiu bela "ludo", kaj, se bonŝancos, rekompenco venos! Sur la poŝtkarta fronto legeblas teksto kaj muziko de la Himno Esperantista: "La Espero" (kiun certe ĉiu el vi parkerigis!). Kiel konate, la teksto estas poemo de Zamenhof, dum la muziko de la franca barono Félicien MENU DE MÉNIL.



Li naskiĝis la 16^{an} de julio 1860 en Boulogne-sur-Mer kaj mortis la 28^{an} de marto 1930 en Neully (apud Parizo): li estis konsulo kaj muzikisto. Esperantistiĝinta en 1901, abunde li skribis artikolojn en preskaŭ ĉiuj Esperantogazetoj, same kiel propagandajn tekstojn en

Ĉio ĉi, tre koncize, prezentas la bonvolemon kaj iasence amon de la Habsburga imperiestrino al Triesto, kiu danke al ŝia agado evoluadis en plej diversaj kampoj: de la socia (aparte pri la egalrajteco de virino), edukada, instruada al sanitara kaj komercada, en plena respekto de ĉiuj etnoj, religioj, lingvoj. Kvankam preskaŭ fanatika en sia katolikeco, ŝi agnoskis al ĉiuj loĝantoj la rajton konfesi propran kredon, tiom ke ĉiu ajn religiano povis starigi sian kultejon, paroli sian gepatran lingvon kaj sekvi siajn kutimojn kaj morojn. Ja tio supre dirita atestas la multajn kialojn por ke oni subtenu la ideon dediĉi signifoplenan monumenton, en centra urba placo, al la Habsburga imperiestrino Maria Teresia. EIDO

franca lingvo. Li estis komitatano de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto kaj direktoro de *Franca Esperantisto* kaj *Franca Esperantiste*, plie ĉef-redaktoro de *La Revuo*. Ekde 1919 Menu de Ménil membris en la Lingva Komitato. Precipe konata li estis kiel *La muzikisto de Esperanto*. Li verkis multajn melodiojn kaj kantojn, skribis muzikan terminaron sed ankaŭ komedietojn kaj rakontojn.

La Espero, kiel poemo, estis unuafoje publikigita (sen titolo) en la *Plena Lerno-libro* de la Tutmonda Lingvo Esperanto por Rusoj, 1890. La kanto iĝis la himno de la E-movado, sed kurioze estas, ke ankaŭ la idistoj uz(as)is la saman melodion.

Tamen estis faritaj ankaŭ aliaj melodioj por la sama teksto: unu estis komponita en 1891 de Claes A. Adelsköld, sveda esperantisto, konstruĝeniero, unua eminentulo favoranta Esperanton en sia lando. Alia aperis en 1903, fare de Achille Motteau, kiu estis franca esperantisto, profesie presisto. Antaŭ ol esperantistiĝi en 1901, li estis volapukisto. En 1904 li verkis tre vastigatan vortaron Esperanto-anglan.

Sekvis en 1909 la komponaĵo de Félicien de Ménil *Movo de milita marŝo*, kiel estas skribite sur la pk-a bildo. Fine, en 1912, aperis alia, tiu de Oscar van Schoor, aperinta ĉe la revuo *Belga Esperantisto*, 4a jaro, n. 5.

Nu, tio ĉi rilatas la surkartan bildon, sed la afero plej interesa por mi estas la malantaŭa flanko de la poŝtkarto. La dense skribita per malfacile deĉifrebla kaligrafio (probable temas



pri mendo de farmaciaj artikloj) estas subskribita de Oscar van Schoor! Pli sube, sur blanka paperpeceto legeblas: Pharmacie-Droguerie - O. van Schoor, sekvas telefonnumero kaj adreso (en Antverpeno). Fakte li estis farmaciisto: vidu lian karikaturon ĉi-apude. Li naskiĝis en 1873 en Antverpeno kaj mortis samurbe en 1936, apenaŭ 63-jara.



Antaŭ ol Esperanto iĝis konata en lia lando, li estis volapukisto, ĉar tre plaĉis al li tiu ideo de internacia lingvo por interpopola komunikado. Kiam volapuko montriĝis netaŭga ilo por facila interkompreniĝado, tiam hazarde li eksciis pri Esperanto kaj kun entuziasmo ĝin tuj eklernis. Tuj poste li fariĝis unu el la plej aktivaj membroj de la Antverpena grupo (1903). Kunredaktoro de la Antverpena farmaciista revuo kaj sekretario de la Internacia Esperanto Farmaciista Asocio (IEFA), li aparte agema estis en kultura kaj folkloro kampoj.

Kiam, en la Belga Ligo Esperantista, en 1907, okazis skismo pro la "Ido-demando", la tiama prezidanto, komandanto René Lemaire, "eliris el la rekta vojo" kaj fariĝis idisto: forirante, li forlogis gravan parton de la gvidantaro kaj kunprenis la organon *Belga Sonorilo*, kies eldonisto li estis, kiu same 'idistiĝis'.

Van Schoor kune kun Amatus Van der Biest, Frans Schoofs kaj L. Van Laere kreis la *Belga Esperantisto*-n, kiu post la unua mondmilito iĝis propraĵo de la Belga Ligo. En 1911 okazis en Antverpeno la 7^a UK kaj

la LKK konsistis el sep Antverpenaj Gemikoj, nome La Sepo por la Sepa. O. Van Schoor havis la taskon de vicprezidanto [*NdR: cĉetable, la unua dekstre*].

Post dek sep jaroj li prezidis la LKK-on por la organizado de la 20^a UK en 1928.

Li estis Lingva komitatano kaj Administranto de la Belga Esperanto-Instituto. Tradukis plurajn librojn kaj flandrajn popolkantojn al Esperanto sed verkis ankaŭ originale. Komponis ankaŭ la marŝon *Antaŭen Esperantistoj*. Nu, tion ĉi mi plej multe ŝatas: pere de poŝtkartoj konatiĝi kun la E-pioniroj, kun eminentaj movadanoj, kaj insiste kaj persiste esplori funde la disvolviĝon de la agado de multaj kaj multaj esperantistoj dediĉintaj sian tutan vivon al tiu instrumento de paca komunikilo kaj interamikigilo, nia lingvo Esperanto.

EIDO

Fontoj: EdE; Belga Esperantisto; La Verda Stelo kaj multaj aliaj E-ĵurnaloj



LOKA ORGANIZA KOMITATO
FRANS SCHOOFS - D-RO W. VAN DER BIEST - LOUIS RITSCHIE - L-TO F. DUPONT - F-INO M. POSENAER - VAN DER BIEST-ANDELHOF - OSCAR VAN SCHOOR
ANTVERPENO 1911



Numero 47 • Jaro 2019 - Redaktejo - eldonejo - presejo: Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio. Tekstoj: Renate kaj Walter Klag, esperanto@chello.at Kun kontribuajo de Rogier Huurman

EI La Bulteneto

Julia Isbrücker-Jaro 2020

En 2020 estos la 100^a datreveno de la 12^a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker (kun-)organizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pruvas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi nian lingvon. Julia (kun-)fondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj (kun-)eldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.



Ĉi-jare mi planas eldoni arĝentan 50-Stelan moneron (simila al la Maria Theresia-Talero) por la honoro de Julia. Sur la 100-Stela monero 2018 aperis viro, René de Saussure (*ndr: vd. maldekstraflanke*), sur la 50-Stela aperos virino. Mi jam kolektas materialon pri Julia. Ekzemple, oni povas tiun materialon uzi por vikipedia artikolo. La ekzistanta artikolo ĵus tradukiĝis en la persan. La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro en presita kaj PDF-a formoj. Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia. En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.

Invito al kunlaboro

Walter Klag, esperanto@chello.at

Krubalo: kio estas tio?

Ĉu manĝaĵo? Aŭ ludo? Ĉu muzeo? Ĉu krimulo? Ĉu filmo? Ĉu infanlibro? Estus bone, ke ankaŭ vi informiĝu, ĉar okaze ke VI lin renkontu ... nu eble tio povus esti eĉ danĝera!

Muso promenas tra arbaro arbusta. Vulpo ĝin vidas, kaj ĝi ŝajnas bongusta.

Se vi demandus al eta muso pri li, vi rapide ekscius, kia li estas.

La museto dirus al vi, ke: "Dentegojn li havas, kaj ungojn barbarajn, kaj en la faŭkego tri dentojn elstarajn"

Promenu plu en la arbaron arbustan kaj malkovru, kio okazas, kiam la sagaca muso renkontas strigon, serpenton kaj malsatan krubalon...

La Krubalo, do, estas timiga bestego, kiu loĝas en la arbaro, kie promenas la muso.

La Poemo NAŠ ČOVO, verko de Silvine Strahimir Kranjčević (1965-1908)

en esperanta traduko

Vjekoslav Morankić, plurjardeka esperantisto el Rijeka, ĉiam tre aktiva kaj iniciatema en la movado loka, nacia kaj internacia, kompetenta tradukanto, kun kiu de longega tempo Triesta Esperanto-Asocio daŭre kunlaboras, nuntempe vicprezidanto de la Esperanto-Societo Rijeka, tradukis ĉi poeziaĵon en Esperanton, kaj ĝin mi proponas al la TEA-Bulteno-Legantaro, certa ke estos de ĉiuj aprezataj kaj la poemo kaj la esperanta versio.

Por interesiĝontoj disponeblas ankaŭ la kroata versio.

Klarigoj pri iuj vortoj en traduko

1. *Homĉjo* = virhomino pli maljuna, kara, ŝatata (signifo en la kroata aŭ serba aŭ bosnia lingvoj simile al patro-paĉjo).

2. *Lisa* = Nomo de la kroata insulo Vis, meze de Adriatika maro. Ĉeestas dialektoj en Dalmatio kaj en iuj ĉemaraj regionoj de Kroatio. Nomo en la itala por insulo Vis estas *Lissa*.

3. *Tegetof* = Wilhelm von Tegetthoff, naskita en Maribor (nun Slovenio) 23-12-1827, mortis en Vieno 17-04-1871. Aŭstria admiralo gvidis en batalo la aŭstro-hungaran floton kontraŭ la Italan Reĝan militfloton la 20^{an} de julio 1866 sude de insulo Vis. La Aŭstro-hungara floto havis grandan venkon. En la kroata originalo Tegetof estas skribita fonetike, tial en la esperanta traduko ĝi estas laŭ fonetika skribo.

4. *Galioto*. En PIV estas eraraj signifoj: 1. Mezepoka remŝipo en Mediteraneo; 2. Nederlanda platfunda fiŝkapti ŝipo. La difinoj ne estas ĝustaj: la vorto *galeotto* signifas en la itala originalo homon sed ne ŝip-

Sed ĉu li estas reala, aŭ ĉu inventaĵo de la museto? Legante la novan tradukon de la tre fama libro, vi ekscios mem!

En decembro pasintjara, okaze de la 20^a naskiĝdato de la Krubalo, aperis la tute nova Esperanta versio de la tutmonde konata porinfana rakonto. La libro estas jam tradukita en 83 lingvojn kaj Esperanto estas la 84^a.

Eldonis ĝin la Esperanto-Asocio de Britio: por detalaj informoj vizitu la ttt-ejon:

<https://krubalo.uk>.

Eblas ekscii ankaŭ ĉe uea.facila.org. Rapidu aĉeti ĝin, por ne riski resti sen!

NIA HOMĈJO¹

Ekde kiam, ho almozul', la manikoj viaj pendis?

- Ekde kiam, mastro mia, oni min ĉe Lisa² sendis.

- Fulme tondris, rompiĝadis, kvazaŭ dioj freneziĝis, Mi surgrimpis ŝipan pinton, ĉar la flago implikiĝis.

- Tra kuglaro kaj fumego, eksturmis ŝipopru' nia, Certe, mi eĉ vivon donus, por Tegetof³-ridet' lia!

- En altec' estante tiel, tuj okupis min marvasteg', Ne videblis ja maro plu, tra nebulego el fumeg'.

- Ja implikiĝis nia flag', sed egale mi mem diris; Militŝipaj krucmaspintoj, akre lule enplektiĝis.

- En momento mi rimarkis, itala soldat' atakas, De mastopint' li embuskas, flagon nian rabi volas.

- Ne, diris mi galioto⁴, per korpo flagon kovris mi, De sube kuglar' surŝutis, ambaŭ korpojn de mi kaj li.

- Mi vidis kiel li falis, poste estis falo mia, Falante forte li kriis: "Ev-ev-iv-a I-ta-li-a"⁵.

- Pensis mi kial itale: ĉe ni, tu⁶ kriacas besto! "Amiraljo⁷ nia vivu", ekkriis mi, tu ĉozoto⁸.

- Senkonscia mi ekestis; longe, longe estis tiel: Ĉar manojn mi perdis, kaj nun, sen manoj mi vivas iel.


- Pensieto, mi ĝin havas, bonaj homoj donas ion. Por amiralj' meson jare; mi pagas almenaŭ tion.

- Dian absolvon mi petas, pro niaj pekaj faradoj, Estu mi viva jaron plu, ke foriĝu malaj aĵoj.

- Irus mi al Dia Patrin', al Krasno⁹ montara sanktej', Ke mi vere trankviliĝu, antaŭ ja prenis min tombej'.

- Doloras min, mastro, anim', ke mi al baptita homo, Vere hundan vorton diris, kiam estis lia falo.

- Sed, per ambaŭ manoj estis, amiraljo defendata. Ne estis mi ĉiam tia, kriplul' senvalorigata.



A 160 ANNI DALLA NASCITA

ZAMENHOF

PROMOTORE DEL
DIALOGO FRA
POPOLI E CULTURE
DIVERSE

INAUGURAZIONE
3 dicembre 2019
h. 18.00
SINAGOGA DI GORIZIA
Via G. I. Ascoli 19

ORARIO
Martedì e giovedì
h. 17.00 - h. 19.00
sino al 21 gennaio 2020



Ingresso libero

A cura di Associazione Esperantista Triestina
Con il patrocinio di Comune di Gorizia
In collaborazione con Associazione Amicizia Italia-Esperanto

Plezure ni anoncas al vi, ke la ekspozicio pri Zamenhof, iniciatoro de la interkomunikiĝo inter popoloj kaj kulturoj diversaj, ne fermiĝos je la 21^a de januaro, sed estos vizitebla ĝis la fino de februaro 2020, ĉe la Sinagogo de Gorizia, marde kaj ĵaŭde de la 17a ĝis la 19a horo.

Vi estas elkore invitataj viziti ĝin!

on. Do en la itala originalo *galeotto* estas: remisto sur galero, plej ofte sklavo, sed ĝi signifas ankaŭ malbonan homon. En la teksto de *Nia Homĉjo* galioto signifas "malbonega homo"-n aŭ simile.

5. "Ev-ev-iv-a I-ta-li-a", originala elkrio de itala soldato = "Vivu Italio".

6. *Amiraljo* = admiralo. En la kroata estas uzata ankaŭ la vorto *Amiraljo* malgraŭ la oficiala esprimo *admiral* (same en la serba aŭ bosnia lingvoj).

7. *Tu* = ci. Estas "tu", ĉar ĝi rilatas al malamika soldato. En Esperanto "tu" ja estas jam uzata de iuj.

8. Ĉozoto = pejorativa aŭ iom ofenda vorto por Italoj uzata en Dalmatio kaj en iuj aliaj regionoj de la ĉemara Kroatio. La vorto devenas de la itala urbo *Chioggia* (kjoĝa). En la 18^a jarcento Dalmation kontaktis la plej multaj italaj fiŝistoj el citita urbo. En la kroata, serba, bosnia kaj montenegra lingvoj ofte gramatike la litero "k" estas ŝanĝata al "č = ĉ" kiel ankaŭ en la turka.

9. Krasno estas pilgrima loko en kroatia montaro Velebit. Sanktejo de Dipatrino.

10. En la kroata originalo estas uzataj lokaj vortoj el Dalmatio kiuj devenas de italaj dialektoj, kaj mi ilin lasis ankaŭ en Esperanto, kiel estas klarigite.

Vjekoslav Morankić

Denton mi eltiris!

Jen leviĝis, kaj ŝajnas tutklare al nova vivo preskaŭ reveni. Sed pripensas mi jam terure al tiu "finjuĝa", kiam ĝi venos...

Kio ĝi estas?



VIGLO


Programo - Januaro 2020

24a, vendredo	20h00 - Ni elektu libron kune legendan, el nia Biblioteko
28a, mardo	18h00 - Dua-gradua kurso
31a, vendredo	20h00 - Konversacia Rondo pri Triesta kuirarto - kunportu viajn specialajn receptojn

Programo - Februaro 2020

3a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - LA EKSPozICIO EN GORIZIA PRI ZAMENHOF
4a, mardo	18h00 - Dua-gradua kurso
7a, vendredo	20h00 - Legado de artikoloj el UNESKO-KURIERO
11a, mardo	18h00 - Dua-gradua kurso
14a, vendredo	20h00 - Legado de libro el nia Biblioteko
18a, mardo	18h00 - Dua-gradua kurso
21a, vendredo	20h00 - Legado de artikoloj el UNESKO-KURIERO - Indiĝenaj lingvoj
23a, dimanĉo	10h30 Ĝenerala TEA-Asembleo Sekvos komuna tagmanĝo
25a, mardo	18h00 - Dua-gradua kurso
28a, vendredo	20h00 - Spektado de bildoj pri Madrido

Aforismoj



Des pli putras la Ŝtato, ju pli multnombraj estas la leĝoj.

Corruptissima respublica, plurimae leges.

Publio Cornelio Tacito, historiisto, oratoro kaj romia senatano (55-58 ĉ.-117-120 ĉ. pK)

Lukto kontraŭ la povo estas lukto de la memoro kontraŭ la forgeso.

Milan Kundera, ĉeĥa verkisto, poeto, eseisto kaj dramisto (Brno, 1^a de aprilo 1929)



Pesimismo rilatas la inteligentecon; optimismo, la volon.

Antonio Gramsci, politikisto, politikologo, filozofo, ĵurnalisto, lingvisto kaj literatura kritikisto (1891-1937)

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Retoj: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 23^{an} de februaro 2020 je la 8h30, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2019:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*).
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*).
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*).
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Laura Lukaĉ*).
 - d) Raporto de la triesta katedrestro (*Elda Doerfler*).
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asocio _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 23^{an} de februaro 2020.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras pagojn de membro-kotizoj de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).